


**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)

✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60 €.** ● Familia: **70 €.** ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20 €.**
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**JULIO-SEPTEMBRO 2024** **Nro. 140 (3/24)**



# ALVENIS AŬTUNO ...

Kaj nia E-Grupo reaktivas post la somero. Vizitu nian (vian) klubejon kaj tie vi havos la okazon paroli kaj samtempe lerni Esperanton, revidi geamikojn, helpi en la vendado de kristnaska loterio, pruntepreni librojn de nia abunda biblioteko, ktp., ktp.

**LOKE**

## Alia membro de nia E-Grupo en la HEF-estraro.



En la hispana kongreso okazinta en Cheste (Valencio) oni elektis novan estraron de HEF (Hispana E-Federacio). Inter la novaj estraranoj, estis elektita, kiel voĉdonanto, nia nuna prezidantino, **Mila Mezo**.

Do, en la nova estraro estas du membroj de la Grupo de Bilbao: Mila Mezo kaj Jesús M. García.

## Niaj kursoj.

Ĉi jare ni planis alian manieron instrui Esperanton. La vendredojn ni kuniĝos por praktiki nian lingvon per babiladoj pri antaŭkonsentitaj temoj. Samtempe, la plej spertaj enkondukos la novulojn en la unuajn paŝojn de lernado.

Do, vi ĉiuj, novaj kaj malnovaj esperantistoj, estas invitataj partopreni niajn kunvenojn. Unu sola kondiĉo: ni klopodu paroli, kiel eble pli, en Esperanto.

## Nuestros cursos.

Para este año, hemos pensado en una forma diferente de llevar a cabo los cursos. Nos vamos a reunir los viernes, tanto los nuevos alumnos como aquellos que ya tienen alguna noción de Esperanto, para practicar la lengua y, al mismo tiempo, introducir a los nuevos alumnos en el Esperanto.

Una sola condición: vamos a intentar, entre todos, hablar lo más posible en Esperanto.

## Kunveno de estraro.



La vendredon 20an de septembro kunvenis nia estraro. La ĉefa celo estis reaktivigi niajn agadojn post la somera feriado kaj pritrakti diversajn aferojn, kiuj ne estis fermataj de antaŭe. Inter ili,

Informo pri la riparoj en la konstruaĵo, kiuj daŭrigas.

Informo pri la alpropriĝo de la sidejo. Jam estis prezentita plendo ĉe juĝejo.

Organizo de novaj kursoj post malsano de la antaŭa instruisto.

Rezervo de kristnaska loterio kaj kvanto rezervota.

Socioj nepagantaj membrokotizojn.

Informo pri la pasinta HEF-kongreso en Cheste kaj pri la venonta en Soria.

# KRISTNASKA LOTERIO 2024.




Ni daŭrigas jaron post jaro la disvendadon de la tradicia kristnaska loterio. La ĉi-jara numero estas **79.564**.

**<u>Ĉiu bileto kostas 5 €</u>**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

**<u>Oni rezervas biletojn al neniu</u>**. **Lasta tago por aĉeti: sabato 14a de decembro**.

**<u>Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto</u>**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1.Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
IBAN-kodo: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la **<u>skanitajn</u>** biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankokonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li/ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **<u>esperantobi@gmail.com</u>** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.




**<u>Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: sábado 14 de diciembre. No se reserva.</u>**

Para ello,hay que seguir los siguientes pasos:

1. Primero, hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao.
IBAN: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**. **<u>Cada billete cuesta 5 €</u>**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.

2. Enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** dando cuenta del ingreso.

3. Enviaremos los billetes, **<u>escaneados</u>**, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.

4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.

5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **<u>esperantobi@gmail.com</u>** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**LOKE**

## Hispana kongreso en Cheste (Valencio).

De la 5a ĝis la 8a de septembro oni okazigis la 82an kongreson de Hispana E-Federacio. Ĉi foje, eble pro la datoj elektitaj, nur unu membro de nia E-Grupo vojaĝis ĝis tiu valencia urbo, malgraŭ ke estis 3 aliĝitaj.






La ununura reprezentanto de la Grupo de Bilbao, dua de maldekstre, pozas kun aliaj kongresanoj.

**HEF**

# Esperanto en virtuala muzeo pri la hispana milito.

La sola virtuala muzeo pri la hispana enlanda milito enhavas nun tekston pri la uzo de Esperanto dum tiu historia evento.



La muzeo enhavas multajn paĝojn kaj bildojn pri la milito en ĉiuj ties vizaĝoj, el la bataloj aŭ la internacia kunteksto ĝis la ĉiutaga vivo kaj la spertoj de la ordinaraj homoj.

Ĝi estis kreita de scienca konsilio en Kanado, kaj troviĝas en: https://vscw.ca/. La plejmulto el la paĝoj havas versiojn en la hispana, la franca kaj la angla, kaj kelkaj en la ceteraj hispaniaj lingvoj.

La teksto pri Esperanto estas legebla en jenaj adresoj:
https://vscw.ca/index.php/es/node/480 (hispane),
https://vscw.ca/index.php/fr/node/480 (france) kaj
https://vscw.ca/index.php/en/node/480 (angle)

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 95. Aŭgusto 2024)*

## NOVA KUNVOKO DE LA KURSOJ DE ESPERANTO EN UNIVERSITATO UNED

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) pere de sia Centro pri Lingvoj anoncis la baldaŭan malfermon de la enskribiĝo por la venonta akademia jaro, inklude de la kurso de Esperanto en ties du niveloj A2 kaj B1. La enskribiĝo malfermiĝis la 5an de septembro kaj **finiĝos la 22an de oktobro**. Estu atentemaj!

Ni memorigas pri tio, ke la anoj de la Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo. Plian kialon por aniĝi!

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 95. Aŭgusto 2024)*

## NOVA INTERKONSENTO INTER HEF KAJ LA MINISTERIO PRI KULTURO.

Hispana Esperanto-Federacio kaj la Ministerio pri Kulturo subskribis novan interkonsenton por reguligi la provizadon de metadatenoj kaj bildetoj en Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio al la Ministerio kaj, pere de tiu ĉi lasta, al la eŭropa retarkivo Europeana.

La interkonsento estas publikigita en la Oficiala Ŝtata Bulteno (Boletín Oficial del Estado, BOE). Kaj ni ricevis la konsenton de la Ministerio publikigi ĝin ankaŭ en Bitoteko. En ambaŭ lokoj vi povas legi la kompletan tekston.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 95. Aŭgusto 2024)*




# Esperanto-kanalo en Vacapo.

Ekzistas Esperanto-kanalo en vacapo.
https://whatsapp.com/channel/0029VafOLdoKGGG9k4T16m3N

*(MGA. 25/07/2024)*

**HEF**

## La venonta HEF-kongreso okazos en Soria.

Laŭ oni aprobis en la ĝenerala kunveno okazinta dum la kongreso de HEF en Cheste, la venonta HEF-kongreso okazos en la bela kastilia urbo Soria, de la 1a ĝis la 4a de majo 2025.

Soria estas unu el la plej malgrandaj provincaj ĉefurboj de Hispanio. Ĝi situiĝas norde de Madrido kaj tre proksima al geografia centro de la lando.Tio certe faciligos la alvenon de multaj kongresanoj.

Estas programitaj diversaj ekskursoj al historiaj lokoj.

## Nova estraro de HEF.

Post renovigo de la estraro de HEF dum la kongreso en Cheste, ĝi restas jene:

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto: | Ángel Arquillos López. | (Málaga) |
| Vicprezidanto: | Alberto Granados Orcero. | (Teruel) |
| Sekretario: | Manuel Parra Benito. | (Madrid) |
| Vicsekretariino: | Elsa Martínez Castro. | (Madrid) |
| Kasisto: | Jesús M. García Iturrioz. | (Bilbao) |
| Voĉdonantoj: | Milagros Mezo del Río | (Bilbao) |
| | Francisco Balibrea Iniesta | (León) |
| | Vicente Manzano Arrondo. | (Sevilla) |

## Nova E-asocio en Segovia.

Nova asocio en Hispanio, en la provinco Segovia. Ĝi komencis sian aktivadon la 1an de oktobro per ekspozicio en la kulturdomo de La Granja de San Ildefonso, Tio daŭros ĝis la 14a de oktobro.
Samtempe, oni okazigos E-kurson baznivelan ĝis decembro, en la sama sidejo kaj gvidata de la HEF-ano **David Trigo**.

## Kurso en la universitato de León.

Ekde la 1a de oktobro, ekiĝos E-kurso en hispana universitato, en la urbo León. Ĝi estos gvidata de la HEF-estrarano **Pako Balibrea** kaj komencos la 1an de oktobro.

## Kursoj en la UNED.

Memoru, ke enskribiĝo en la kursoj de la Hispana Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (UNED) finiĝos la 22an de oktobro kaj ke la lernantoj povas loĝi en kiu ajn loko tra la mondo ĉar oni postulas nur aliron al Interreto kaj pagon de la enskribiĝo.

Pliaj informoj:
https://www.esperanto.es/nueva-edicion-de-los-cursos-de-esperanto-en-la-uned/.

## TRA LA MONDO …

# Politikistoj de EU kaj Esperanto.

Fine de aprilo ĉi-jare **Etsuo Miyoshi** sendis leteron kun kopio de reklamoj en ok ĉefaj gazetoj al ĉirkaŭ 2 mil 600 parlamentanoj en Francio, Germanio kaj Pollando. Li ricevis respondojn de 31 parlamentanoj. Tri kontraŭis, dirante: “En EU, ni komunikas rekte en la angla, do ne bezonas Esperanton” kaj “Mi dubas pri artefaritaj lingvoj”, kaj kvin aŭ ses donis neklarajn respondojn, jes aŭ ne. Ne estis respondo de Pollando; kelkaj aliaj opinioj listiĝas sube.

**Maria Klein-Schmeink**, gvidanto de germana Verda Partio: “Ni kredas, ke Esperanto, kun iom da lernado, havas eblecon permesi komunikadon, antaŭenigi internacian komprenon kaj antaŭenigi pacon”.

Franca senatano **Christophe Chaillou**: “Mi legas la regulojn de Esperanto kun intereso kaj kundividas la valorojn de universaleco, unueco kaj humanismo antaŭenigitaj de ĉi tiu movado”.

**Malu Dreyer** el la germana parlamento: “Anglalingvanoj havas klaran avantaĝon en EU, kaj neanglalingvanoj povas diri nur tion, kion ili povas esprimi en la angla. Koran dankon pro viaj klopodoj”.

**Nicolas Dupont-Aignan**: “Se ni antaŭenigos Esperanton, ni povas eskapi la angla-usonan regadon. Mi planas aldoni Esperanton kiel atuton kaj kandidatiĝi por la franca prezidant-elekto post tri jaroj”. *(Mi havis grandajn esperojn pri li, sed bedaŭrinde li perdis la elekton en junio.)*

Ministro pri eksteraj aferoj de Francio, **Stéphane Séjourné**: “Ni plene konscias pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ŝatus vidi ĝian evoluon en Francio”.

Prezidantino de la Eŭropa Komisiono **Ursula von der Leyen**: “Vi proponis, ke Esperanto fariĝu la “komuna lingvo” de EU. Tamen ni fidas antaŭenigi niajn 24 oficialajn lingvojn kaj aktive laboras pri la uzo de aliaj lingvoj”.

Mi estis nekredeble surprizita, kiam mia leterkampanjo atingis la prezidantinon **von der Leyen** la 2an de majo 2024, kaj mi ricevis ŝian respondon la 15an de majo: “Mi ŝatus esprimi mian dankemon pro via letero komence de majo, en kiu vi proponis Esperanton kiel la oficialan lingvon de EU. Tamen EU ne havas la aŭtoritaton decidi pri lingvo, kaj ni firme antaŭenigas la 24 oficialajn lingvojn establitajn de la EU-Konsilio kaj subtenas multlingvismon”.

Mi respondis la 4an de julio 2024:

“Dankon pro atentigo pri la diversaj subtenaj agadoj de EU rilate Esperanton registrita kiel pola kaj kroata kultura heredaĵo. Ĉi tiu afero trovos lokon en la EU-kadro. En la letero de la prezidanto: EU-Komisiono ne havas la aŭtoritaton decidi pri la lingvo. Ĉu tio signifas, ke necesas akiri la konsenton de la 27 membroŝtatoj? Eĉ se dulingveco inter naciaj lingvoj kaj Esperanto estus revolucia plifortigo de EU kaj revo realiĝanta apud ununura merkato kaj ununura valuto! Ĉu vi povas prezenti proponojn al 27 landoj?” (*Daŭrigas*)

# TRA LA MONDO …

(*el antaŭa paĝo*) Neatendite, la 4an de julio mi ricevis dankleteron de la prezidanto **Emmanuel Macron** pro sendo de mia libro. Mi ne povas kredi, ke la prezidanto de Francio ne legas *Le Monde* aŭ *Le Figaro*, kaj mi pensas, ke estas evidente, ke li legas la reklamojn: “EU jes, Eŭro jes, Esperanto?” Se la reklamo ne estus atinginta lin, mi ne estus ricevinta la dankon.

Konsiderante la nunan situacion ne plu eblas atendi, ke la reagoj de gazetlegantoj movos la amaskomunikilojn kaj rompos la lingvan muron. Tamen, ĉu ankoraŭ eblas, ke granduloj en la politiko, ekonomio kaj kulturo agos por fundamente fortigi la Eŭropan Union? Kio okazus, se sinjorino von der Leyen ekstarus?

*(“La Ondo de Esperanto”. 27/08/2024. https://sezonoj.ru/2024/08/europo-5/)*

## Partio “Europe-Democratie-Esperanto”.

Ĝi prezentiĝas, nur en Francio, al balotado por la Eŭropa Parlamento.
2019/05/26: 18.587 voĉdonoj.
2024/06/09: ??.??? voĉdonoj.

## Tradukado en Vacapo ("WhatsApp")

Eblas traduki lingvojn ene de Vacapo ("WhatsApp") en telefonoj "Android".
Fakte la sistemo uzas la tradukilon de Google "Translate" (kie ekzistas Esperanto).
Oni bezonas, pri la telefono:
> Sistemo Android.
> Ke estu instalita la tajpilo "Gboard" (de Google).

Oni premas la simbolon de la rado (por "konfiguracio") kaj aperas la ilon por traduki (kaj oni povas lasi ĝin en la preferataj).
Mi sendas videon (5 min.) kun klarigoj en hispana lingvo:
https://youtu.be/ky5b30Zphsw?si=4THUgLfFIk_BPYLD

Krome: Alia kurioza eblo: oni povas fari foton de teksto en alia lingvo (ekz.: kun kirila alfabeto) kaj per la apo "Lens" oni povas traduki ĝin al teksto. Kvankam la rezulto ne estos perfekta.

*(LN. 27/06/2024)*

## U.K. 2025 en Brno.

La 110a Universala Kongreso de UEA okazos en Brno, Ĉeĥa urbo, kiu situiĝas en la sudorienta parto de la lando.

